

11-a Monda Kongreso de la Mondfederalistoj

Claude Gacond, 60-a radioprelego, 1964.01.22 & 25

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la 11-a Monda Kongreso de la Mondfederalistoj.

Inter la gravaj internaciaj manifestacioj de la pasinta jaro elstaras la Kongreso de Tutmonda Asocio de Mondfederalistoj, kiu grupigis en Tokio kaj Kioto (Japanio) multajn fakulojn pri la internacia juro kaj idealistojn, kiuj, kiel la esperantistoj, konstruas pacience la fundamentojn de la morgaŭa mondo. Tiu kongreso okazis dum la fino de la monato aŭgusto. Ĝin partoprenis delegitoj el plej diversaj landoj. La du ĉefaj labor-lingvoj estis la japana kaj la angla.

Ni bazos niajn hodiaŭajn dirojn sur du raportoj : tiu de la esperanta revuo *Oomoto*, kiu estas redaktita de japano, kaj tiu, kiun publikigis la franclingva revuo *Monde Uni*, la oficiala organo de Monda Federacia Unuiĝo kaj Universala Movado por Monda Federacio, du el la plej gravaj mondfederalistaj asocioj. La konfrontado de raportoj de aziano kaj eŭropano estas por ni garantio por la objektiveco de nia propra raporto.

De tiuj informfontoj ni rimarkas, ke la problemo de la malarmado fariĝis la ĉeftemo de tiu kongreso. Tiun temon tre bone resumis la kongres-slogano skribita sur granda banderolo en la kongresejo. Ĝi estas « Al unuiĝita mondo sen milito ».

Kvar laborkomisionoj studis la problemojn, kiuj konkncias la unuiĝon kaj la malarmadon de la hodiaŭa dividita mondo. Kvindeko da fakuloj raportis pri la hodiaŭa stato de la studoj kaj internaciaj akordoj, kiuj difinas la penson kaj la politikon de la ŝtatestroj, juristoj, ekonomiistoj, sciencistoj kaj filozofoj.

La unua komisiono okupiĝis pri la neceso revizii la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj, pri la eblecoj plifortigi tiun Organizaĵon kaj Internacian Arbitracian Kortumon. Ili ekzamenis la rimedojn, kiuj povos konduki la naciojn de la mondo transdoni sian suverenecan rajton por milito al tiuj reorganizitaj superaj internaciaj instancoj.

La dua komisiono diskutis pri la ekonomiaj problemoj, kiujn koneksas la malarmado. Ĝia konkludo estis, ke militcela ekonomio estas hodiaŭ rapide ŝanĝebla al pac-cela ekonomio kondiĉe, ke tiu ŝanĝo okazu sur la bazo de tutmonda ekonomia plano akceptita de ĉiuj registaroj kaj popoloj. Esplor-organizo, kiu atente studos la ekonomiajn problemojn de la malarmado estis ekfondita en Tokio.

La tria komisiono studis la moralan respondecon de la homoj en atomepoko. Ĝi akcentis la gravon de la eduko sur la penson de la homoj. La eduko devas formi mondfederalismanojn. En tiu komisiono la reprezentanto de Universala Homama Asocio, s-ro Sakurai, faris raporton, kies teksto formis la kernon de la komisiona rezolucio. Mi legas kelkajn liniojn de tiu raporto, kiu portas la titolon *Moralaj bazoj de la Mondfederalismo* kaj bone resumas la hodiaŭan penson de la mondanistoj.

Ĝi diras : « Kun la evoluo de nukleaj armiloj la vivo de la homaro estas sub ilia konstanta minaco kaj la maltrankvilo regas la mondon. Por eviti la eventualecon de memdetruo la homaj konscienco kaj intelekto diktis la projekton de mondfederacio. La historio de la mondo instruas, ke la kunpuŝiĝo de la senbridaj naciegoismaj intereso kaj la nelimigeblaj suverenaj rajtoj de la nacioj kondukas al internaciaj konfliktoj kaj militoj. Por ke ĉiuj nacioj kunekzistadu kaj kunprosperadu en paco necesas, ke ili estu organizitaj en mondfederacio, transdoninte parton de la por si absoluta suvereneco al mondregistaro, kies funkcio estas solvi la internaciajn konfliktojn. La scienca kaj teknika progreso plimalgrandigis la tempon kaj spacon de la terglobo en la rilatoj ne nur trafikaj, sed ankaŭ politikaj, ekonomiaj kaj kulturŝanĝaj ; sen disrompi la barojn, kiuj alte staras – videble aŭ nevideble – inter la naciaj

11-a Monda Kongreso de la Mondfederalistoj

Claude Gacond, 60-a radioprelego, 1964.01.22 & 25

kaj rasaj grupoj, ne estas imageblaj la prospero kaj paco de unu granda tuthomara socio. »
(Fino de la citaĵo.)

La kvara komisiono grupigis la junulojn kaj studentojn. Ĝiaj anoj esprimis sian senpaciencon vidi akceliĝi la membriĝon al UN far ĉiuj landoj, kiuj ne ankoraŭ estas membro-ŝtatoj, inkluzive komunistan Ĉinion. Por ili UN devas fariĝi vere universala por povi poste evolui al monda registaro kaj monda parlamentejo.

Inter la plej gravaj partoprenantoj al tiu Kongreso ni citu la Nobel-premiiton profesoro Hideki Yukawa, fakulo pri nuklea fiziko. Li havis la honoron malfermi la Kongreson. Tiam li emfazis, ke hodiaŭ la mondfederalismo ne plu estas revo sed ideoforto, kiu disvastiĝas en la tutan mondon. Lordo Attlee venis el Britio esprimi sian esperon vidi antaŭ sia morto la unuajn paŝojn de la homaro al la konstruo de vera monda registaro. Multaj ŝtatestroj kaj famuloj sendis siajn salutesperojn al tiu Kongreso. Ni menciuj tiujn de la japana ministro pri Eksteraj Aferoj s-ro Masajoŝi Ohira, de la Guberniestro de Tokio Rjotaro Azuma, de la brita Ĉefministro s-ro Macmillan, de Papo Paŭlo sesa, de la unua ministro de Hindio s-ro Nehru, kiu ricevis poste en Nova Dehli la kongresanojn dum ilia reveturo al Eŭropo.

En Japanio la mondanistaj ideoj treege disvastiĝis. Hodiaŭ en tiu lando 253 komunumoj sin proklamis mondanigitaj. Ili reprezentas 45 milionojn da loĝantoj. Tiuj mondanigoj signifas, ke super la naciaj limigitaj leĝoj ekzistas tuthomaraj moralaj leĝoj al kiuj ĉiuj komunumoj devas nepre obei. Gravaj popolaj manifestacioj organizitaj en la stratoj de Tokio, Kioto, Osaka kaj Hiroŝima aklamis la kongresanojn kaj rememorigis la volon de la japana loĝantaro vidi la Unuiĝintajn Naciojn evolui al Mondregistaro.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la 12-a Monda Kongreso de la Mondfederalistoj. Aŭskultu regule Radio-Svislandon.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-